FERAJ REGULOJ
Mia konscia memo:
1. Ne asertu malveraĵojn.
2. Ne diru malbonon pri la malĉeestantoj.
3. Ne profitu per ies nescio.
4. Ne fanfaronu pri viaj bonaj agoj.
5. Ne postulu kiel esti la via tion, kio apartenas al aliulo.
6. Ne kritiku aliulojn firmigante ilin en iliaj eraroj.
7. Ne ŝparu vian penon en la laboro, kiun vi devas fari.
8. Servu fidele ĉiujn, kiuj bezonas vian helpon.
9. Ne serĉu profiton per la metado de aliuloj en malfacilaĵojn.
10. Ne malhelpu iun por profiti vin mem.

KUPRAJ REGULOJ
Mia konscia memo:
1. Konsideru vian respondecon esti sankta.
2. Estu ĝentila al ĉiuj.
3. Faru nenion, kio povas doni al vi malbonan konsciencon.
4. Helpu volonte la bezonantojn.
5. Ne malestimu tiujn, kiuj estimas vin.
6. Ne juĝu aliulojn laŭ via propra leĝo.
7. Ne havu malbonan volon kontraŭ via plej malbona malamiko.
8. Ne influu iun fari malbonon.
9. Ne havu antaŭjuĝon kontraŭ iu.
10. Montriĝu fidinda en ĉiuj viaj aferoj.

ARĜENTAJ REGULOJ
Mia konscia memo:
1. Konsideru devon egale sankta kiel religio.
2. Uzu takton en ĉiu okazo.
3. Metu homojn ĝuste en via estimo.
4. Ne estu al iu pli ol oni atendas.
5. Konsideru la sentojn de ĉiu animo.
6. Defiu neniun, kiu ne estas via egalulo.
7. Ne paradu vian malavaron.
8. Ne petu komplezon de iu, kiu ne faros ĝin.
9. Alfrontu viajn neperfektaĵojn per la glavo de memrespekto.
10. Ne permesu vian animon humiliĝi en malfavoraj tempoj.

ORAJ REGULOJ
Mia konscia memo:
1. Estu fidela al viaj principoj en prospero kiel en malfavoraj tempoj.
2. Estu konstanta en fido en la suferoj kaj sortoŝanĝaĵoj de la vivo.

3. Protektu la sekretojn de amikoj kiel esti la plej sankta konfido.
4. Estu konstanta en amoro.
5. Ne malobservu viajn promesojn, senkonsidere tion, kio okazas.
6. Konfrontu la mondon subridante en ĉiuj kondiĉoj de la vivo.
7. Se vi posedas ion, konsideru pri tiu, kiu ne posedas ĝin.
8. Tenu vian honoron senkonsidere de la kosto.
9. Alte tenu vian idealon en ĉiuj cirkonstancoj.
10. Ne neglektu tiujn, kiuj dependas de vi.